



NEDERLANDA KATOLIKO

Maandelijksch officieel orgaan van den Nederl. R. K. Esperantistenbond
„Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch. Opgericht 29 Aug. 1909

Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd — „Ĉion per amo, nenion per forto.” (S. Fr. de Sales).

VASTE MEDEWERKERS: Br. AUGUSTINUS, H. DAMEN, Br. EULOGIUS, PATER
CALL. PRELLER O.P., H. A. ROELOFS, P. A. SCHENDELER en H. B. van ZWET

Abonnementsprijs f 1.50 per jaar
Eksterlanda Jarabono . . f 2.—

Hoofdredactie:
P. HEILKER TE HOOFDDORP.
Adres van Administratie:
THEO BODDEKE TE BUSSUM.

Afzonderlijke nummers 15 Cts.
Advertentiën per vakje 75 Cts.

Attentie

Wegens drukke werkzaamheden heeft de Bondspenningmeester, de heer T. Marvee, zijn functie nedergelegd, deze zal worden waargenomen door den secretaris, den heer H. B. van Zwet, Schoolpad 21, Laren (N.H.)

Tevens brengen wij onder Uwe aandacht dat „Nederlanda Katoliko” is aangesloten bij de postcheque en girodienst onder Nr 121449 kantoor Laren (N.H.).

Oficiala Parto

UNUIĜOJ

Nova unuiĝo. „La Limburga Stelo” Gennep, 33 membroj.

„Stelo de l' maro” Nijmegen.

Novaj membroj:

Sro A. J. Niesten, St. Annastraat 135

Sro A. L. Niesten, id.

Fino Glatz, de Ruitenstraat 179

Sino Welters, Rembrandstraat 12

Fino L. Koenen, P. Brugmanstraat 12

Sino Velthuisen, St. Annastraat 103

Sino Karthaus, Dorpstraat 44. Hees

Fino Karthaus, Wilhelminasingel 24

Sro W. H. Nillesse, Jan van Galenstraat 21

Adressanĝoj:

Sro H. J. Baal, Hertogstraat 8

Sro W. H. Seegers, van Trieststraat 31

Sro H. Peters, ter Hoeddwarsstraat 84

Eksiĝis:

Sro A. C. Geertsen

Sro P. van Horssen

Sro J. Zuure

Sro P. Kokke

Sro H. Maassen

„Por Dio kaj Eklezio” 's-Gravenhage.

Adressanĝo:

Sro H. D. v. Calsteren, De Constant Rebeque
straat 34

„Eĥo de Kuyklando” Cuyk.

Nova membro:

Sro A. Teunissen, Grenkomercisto, A 4 Haps.

FAVORANTOJ

Novaj:

Sro P. Groenendaal, Westmolenstraat 1, Schiedam.

Sro J. W. Beyk, O.I.-straat 32, Haarlem.

Peto! Ni petas insiste al la sekretarioj(inoj) de la unuiĝoj ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 20a, al la sekretarioj Schoolpad 21, Laren (N.H.).

Saman peton al la favorantoj pri adressanĝoj.

Plendojn pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko” al la sama adreso.

La ĉefsekretario,

H. B. VAN ZWET

Du Pacoj.

Novembro jam forpasis, La monato de l' mortintoj, kiu nin vive memorigis niajn fratojn kaj fratinojn mortintajn. La tuta naturo, griza kaj trista, ŝajnis kunfunebri kaj igis nin meditema pri nia iama mema morto kaj transpaŝo de l' tombo en la vivon postmortan. Kaj insiste ni preĝis: „Sinjoro, donu la eternan ripozon al la animoj

de l' mortintaj kreduloj", farante al ni amikojn ne per la Mamono, sed per piaj preĝoj, elkore supresenditaj al la kompatema Koro de Jezuo.

Vere, Novembro estas profitdona monato tiel por la animoj retenitaj en la purgatorio, kiel por ni mem kaj fine por Dio, kiu sopiregas al la feliĉo ĉiela de siaj infanoj suferantaj. Ho! ke ne sole la Novembro-monato al ni memorigu niajn kunfratojn kaj kunfratinojn en Kristo. Ĉiam, tagon post tago ni preĝu: „Savu la animojn el la suferoj purgatoriaj kaj donu al ili la pacon eternan!”

Novembro jam forpasis kaj novan monaton ni ree ĝisvivis. Decembro, la monato de l' naskiĝo de Kristo. Per fervoraj preĝoj kaj pentofaro ni nin preparas por la veno de Kristo, renaskiĝonta en la koroj niaj. Kristnasko, la festo de l' paco surtera. Ni ĉiuj sopiras al ĉi tiu paco, ne nur kiel paco anima sed precipe en la nuna tempo kiel paco tutmonda. Ni ĉiuj fervore jam longan tempon laboradis por Esperanto, laŭ nia konvinko tiel efika perilo por tiu paco tutmonda. Ĉu ni eble ne tro multe fidiĝis ĝis nun je nia propa forto? Ĉu ni antaŭ nia homa laborado ĉiam urĝe rekomendis nian idealon al Kristo, reĝo de l' paco?

Ho! nun estas la oportuna tempo! Kristnasko, la festo de l' paco, estu la tago, je kiu ni plenfide preĝu kaj petu la pacon surteran, promesitan sur la Betlehemaj kampoj al la homoj bonvolantaj.

Ni akceligu la pacon eternan por niaj mortintoj, por ke ni meritu la pacon surteran, por ke ni fruktodone laboradu per Esperanto, kunhelpante Dion fondi la pacoregnon sur tero.

E.

Ons derde Congres

Het derde Nederlandsch Esperanto-congres zal plaats hebben op 28 en 29 Mei 1927 te Haarlem. Daar zal niet alleen herdacht worden het 40-jarig bestaan der wereldtaal Esperanto, maar ook het feit, dat het voor 25 jaar in Nederland werd geïmporteerd.

De bloemenstad verwacht dan ook vele honderden Esperantisten uit alle oorden des lands.

Men wachte niet, zich spoedig aan te melden bij Sinjoro G. Hoogeveen, Nieuwe Gracht 80 te Haarlem, per postwissel of postcheque. Deelname voor beide dagen kost f 2.—, voor één dag f 1.—,

terwijl helpcongressisten, die niet persoonlijk aanwezig kunnen zijn, hun steentje ad f 1.— bijdragen.

Wij zullen in de volgende nummers van N. K. de namen der deelnemers en deelnemsters opnemen. Zie voorts het desbetreffende Esperanto-artikel van het plaatselijk organisatie-comité.

Nia 3a Nederlanda Esperanto Kongreso. 1887 — 1927.

Estis en la jare 1887, ke modesta, homama okulkuracisto kuraĝis venigi en la mondon novan senton, sendi tra la mondo fortan vokon. Esperplene li forsendis sian unuan broŝuron subskribita de Dr. Esperanto.

Kiom da noktoj li pasigis, nedormante. Kiel forte batis lia koro pro espero, maltrankvilo. Kiel akceptos la mondo mian projekton? Ĉu ĝi estos salutata au forpuŝata? Ho! mia kor', ne batu tiel maltrankvile! li skribis. Vere, estis riska entrepreno, tuj post la falo de Volapük peti la atenton de la mondo por nova projekto de helplingvo.

Tamen, lia verko estis akceptata kaj paŝo post paŝo disvastiĝis en la mondo unu el la bonaj pacigiloj. Ne tre facile tio okazis, tute ne. La pioniroj de nia lingvo povas atesti, ke ili renkontis multajn barojn, sed pensante ke eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan, ili persistis, ili daŭrigis la titanan laboron.

Ho, multe ni ŝuldas al ili. Honori ilin, ni devas.

Tion ni faros la sekvontan jaron en Haarlem!

Ne estas mia intenco priskribi la vojon de Esperanto tra la mondo. Ne estas al mi skribi memorartikolon pri Nia Majstro. Pli „lertaj plumoj” faros tion. Ne, mi ne skribas pri la malfacilaĵoj, pri la batalado kaj atingitaj sukcesoj. Ne, mi nur volas atentigi vin, ke la sekvonta jaro estas por ni, tutmonda Esperantistaro, grava jaro. Ĉu ne? Ni tiam festos la 40-jaran ekzistadon de Esperanto. Ni tiam pensos pri la malforta fortulo. Vere, korpe li estis malforta sed spirite li estis unu el la plej grandaj fortuloj, kiujn la mondo estas havinta.

Ĝeamikoj, ni festos! En granda rondo familia ni memoros la sekvontan jaron la 40-jaran ekzistadon de nia lingvo! Grandioza la festo devas esti. La indiferenta mondo devos esti konvinkata, ke Esperanto vivas kaj prosperas.

Kiam ni memoras nian naskiĝtagon, ni invitas

parencojn kaj amikojn. En gaja rondo ni pasigas la tagon. Edziĝaj memortagoj estas grandaj festoj, ni ne ŝparas penadon kaj kostojn sed zorgas, ke niaj gastoj estas kontentaj. Ofic-jubileoj eĉ oficiale estas festataj. Amikoj, mi nur volas diri, ke iu ajn memortago ne estas festata en soleco, kontraŭe, ni ĝojas, kiam ni vidas, ke ankaŭ aliaj kunfestas; same estas rilate nian Esperanto-jubileon. Ni ne restos en propra domo, nek en loka societo, ne, ni kunigos nin en „granda rondo familia”. Ni kunvenos en unu loko en unu domo. Grandamase ni venos kaj renkontos unu la alian. Tial, centoj da Esperantistoj en Nederland venos la sekvantan jaron en Haarlem por festi. Jes, eĉ du jubileojn ni havos. En 1902 kuraĝis Sro Dreves Uitterdijk eldoni en nia lando la unuap lernlibron de Esperanto. Jam 25 jaroj pasis de post tiu kuraĝa faro. La rezulto atingita? Pri tio aliaj volas rakonti al vi. Mi nur atentigas vin, ke la sekvonta jaro estas por ni *tre grava jaro*, ke nia 3a estos grava kongreso. La sukceso dependas grandparte de vi, amikoj. Pripensu ke estas bona okazo fari grandan propagandon. Diru, same kiel ni, la L. K. K.: *Nia kongreso nepre devas sukcesi!*

Laboru, konvinku, propagandu, sed antaŭ ĉio: *Venu.*

Montru, ke la vera Esperantismo penetris ankaŭ en vian koron. Sciu vian devon.

La *tuta* Nederlanda Esperantistaro festos la sekvontan jaron la Zamenhofan memortagon en Haarlem.

Por la Loka Kongresa Komitato
E. de W.

3a Nederlanda Esp. Kongreso

Haarlem la 28an kaj 29an de Majo 1927a

BULTENO 1a

K. K. K.

Dum la kongreso en Nijmegen oni esprimis la deziron, starigi „Konstanta Kongresa Komitato”, kies tasko estus, prizorgi la sekvantajn kongresojn. La propono estis akceptata kaj la rezulto estas, ke la 3 Nederlandaj Societoj, nome: La Estonto estas Nia, Nederlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj, Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, elektis el siaj membroj la K. K. K. konsistante el la sinjoroj: P. Heilker, prezidanto,

Hoofddorp (N. K.); W. H. G. van Tinteren, (L. E. E. N.); P. Krijt, (N. F. L. E.), ambau lastaj el Amsterdam.

L. K. K.

Konfirme la deziron de la K. K. K. la Harlemaĵ grupoj elektis el sia mezo „Loka Kongresa Komitato”. De ĉiu grupo 3 membroj. La L. K. K. konsistas al la sinjoroj: E. de Wolf Jr., prezidanto, (Komprenado faras Pacon); L. J. Vogels, Busken Huetstraat 26, provizora sekretario, (Abbè Richardson); G. Hoogeveen, Nieuwe Gracht 80, kasisto, (Abbè Richardson); A. Rutgers, (K. f. P.); H. J. W. Habermehl, (K. f. P.) kaj Jac. Vollaerts, (Abbè Richardson), komitatanoj.

Kongreskotizo.

Ĉar la 3a daŭros nur du tagojn, ni fiksas la kotizon kiel eble plej malmulte. Por du tagoj ĝi estas f 2.—, por Sabato aŭ Dimanĉo f 1.—.

Helpkongresano.

La komitato atendas amason da vizitantoj, precipe ĉar ni la sekvontan jaron festos la 40-jaran ekzistadon de Esperanto en la mondo kaj la 25-jaran ekzistadon de la Nederlanda movado. Sed, tamen povas okazi, ke pro distanco aŭ iu alia cirkonstanco pluraj Esperantistoj ne povos veni, kiel ajn volonte ili volus. Tiuj Esperantistoj povas subteni la kongreson kiel helpkongresano. Ili pagas minimume f 1.—.

Garantiakapitalo.

La komitato esperas, ke la monrimedoj estas sufiĉe por egaligi la kostojn. Kiel eble plej ekzakte estos zorgata, ke la elspezoj ne superas la enspezojn, sed tamen povas okazi, ke ni havos neatenditajn elspezojn. Por tiuj ni fondis garantian kapitalon.

Kongreslibro.

La komitato konsideras la eldonon de kongreslibro. Kiam ĉiu Esperantisto en nia lando sendas f 0,25, la eldono efektiviĝos. La libro samtempe fariĝos adresaro de la Nederlandaj Esperantistoj,

ĉar ĉiu partoprenanto estos metata en ĝi. (Nomo kaj adreso).

PLUAJ SCIIGOJ SEKVOS.

La Nederlandaj Esperantistoj nun sciu sian devon. Por honori nian Majstron, nia devo estas veni grandamase en nian 3an kongreson. La kostoj ne estas malhelpaĵo kaj la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj estas sufiĉe belaj por pasigi tie 1¹/₂ tagojn. Ni certigas vin, ke la L.K.K. faros ĉion por agrabligi al vi la restadon en Harlema.

Geamikoj, propagandu, instigu, sed antaŭ ĉio: *Venu.*

Ne prokrastu vian aliĝon. Sendu tuj vian poŝtĉekon, aŭ poŝtmandaton al nia kasisto, Sro G. Hoogeveen, Nw, Gracht 80, Haarlem.

Ĉiujn korespondaĵojn rilate la kongreson oni sendu al la sekretario, Sro L. J. Vogels, Busken Huetstraat 26, Haarlem.

Monsendaĵojn oni sendu nur al la kasisto.

Ĉiuj artikoloj por la naciaj gazetoj devas esti sendataj al sro. E. de Wolf Jr., Joh. de Breukstraat 34, Haarlem.

BUITENLAND

Het 11e Nationaal Vredescongres van Valence (Frankrijk) nam in zijn zitting van 24 Sept. 1926 de volgende motie aan:

Aangezien het Algemeen Bondscongres van Luzern in 1905 en dat van Parijs in 1925 zich zeer gunstig uitliet over Esperanto als hulptaal,

Aangezien deze hulptaal reeds door zeer vele wereldorganisaties als zoodanig werd aanvaard,

Aangezien de groote massa, die slechts gewoon lager onderwijs geniet, — door het Esperanto als tweede taal naast de moedertaal te aanvaarden — eenerzijds de eigen landstaal beter zal begrijpen en anderzijds in staat zal wezen tot internationaal verkeer,

verzoekt het 11e Nationaal Vredescongres derhalve:

1e. Aan alle onderwijzers en onderwijzeressen les te nemen in deze taal, welke spoedig en gemakkelijk is aan te leeren, en vraagt hun tevens alles in 't werk te willen stellen om deze taal te doen onderwijzen — buiten de schooluren — aan alle kinderen, zoowel jongens als meisjes.

2e. noodigt alle onderwijsautoriteiten uit de middelen te beramen, die er toe kunnen leiden, dat het Esperanto op de lagere en middelbare scholen worde ingevoerd.

Door den commissaris der Posterijen en Telegrafie in Sovjet-Rusland wordt bij dekreet van 17 Juni 1926 nogmaals in herinnering gebracht, dat sinds 1 Nov. l.l. het Esperanto officieel aanvaard is als „klara lingvo” in het internationaal telegraafverkeer.

Dekreet der Grieksche regeering over Esperanto.

Door de Grieksche Regeering is een dekreet uitgevaardigd (28 Oct. 1926) om de invoering van Esp. op alle inrichtingen van onderwijs te begunstigen, Tegelijk met de uitvaardiging van dit dekreet benoemde de Min. v. Onderwijs Dr. *Anakreon Stamatiadis* tot leeraar der Esperantocursussen aan de onderwijsinrichtingen in Athene.

KATHOLIEKEN! Wordt lid van een der aangesloten Katholieke Esperantisten-Vereenigingen of begunstiger. — Voor Begunstigers minimum f 1.— per jaar, met orgaan minimum f 2.— per jaar. —

Bezoekt het 3e Nederlandsch Esperanto-Congres te Haarlem
